Al mia korespondant(in)o!

Nun vi eble miras, kiam mi petas vin fari al mi tre gravan servon. Tamen mi estas tutcerta, ke vi volonte plenumos tiun gravan servon, kiu koncernas ne nur min kaj la svedajn esperantistojn sed fakte nian tutmondan movadon.

Iom post iom la diversaj radiostacioj en la mondo rekomencas siajn disaŭdigojn en Esperanto. Sed bedaŭrinde la sveda radio ankoraŭ ne decidis fari regulajn programojn en la internacia lingvo. Tamen mi scias, ke oni povas baldaŭ esperi je regulaj dissendoj, se la radio-aŭtoritatoj nur scias, ke ili povas kalkuli je granda aro da aŭskultantoj en diversaj landoj.

Via kunhelpo estas nun tre valora! Mi petas vin skribi ~~leteron~~ en via propra (nacia) lingvo al la sveda radio laŭ adreso, kiun vi trovas ĉi sube. En la letero vi petu disaŭdigojn en la internacia lingvo Esperanto pere de la fortaj svedaj radiostacioj. Vi povas mem decidi, kion vi skribu. Sed estas preferinde peti informojn pri la sociaj cirkonstancoj en Svedujo, pri la svedaj kutimoj kaj moroj, pri la interesaj landopartoj en la plej norda Svedujo aŭ en alia regiono (ekz. Värmland aŭ Dalarna), pri la sveda literaturo, arto kaj muziko. Vi petu svedan muzikon kun samtempaj klarigoj en Esperanto. Kompreneble vi povas peti programojn pri Tio ~~kio ajn~~, kio interesas al vi.

Grave! Nenion skribu pri tio, ke vi estas petata de mi skribi al la sveda radio. Estas nome tiel, ke la aŭtoritatoj ne tre volonte aŭskultas la svedajn esperantistojn. Sed kiam vi skribas estas tute alia afero, ĉar tiam ili komprenas, ke ne nur la svedaj esperantistoj ~~volas~~ la programojn. La sveda radio volas scii, ke homoj en la ekstera mondo aŭskultas, kiam ĝi sendas en Esperanto.

Anticipe koran dankon pro via treege valora helpo.

Kun saluto